# ALIĜDEKLARO

67, avenue Gambetta
FR-75020 PARIS
Tel.: +33.1.47.97.87.05
Fax: +33.1.47.97.71.90
E-poŝto : satesper@noos.fr

Leginte la dorspaĝe presitan ekstrakton el la Statuto de SAT, kompreninte kaj aprobinte la celon de tiu ĉi Asocio, mi :

Familia nomo :.......................................................Persona nomo :.................................

Adreso :...............................................................................................................

..........................................................................E-poŝto................................................

Esperantofonetika prononco de la urbo :...........................................................................

Esperanta nomo de la urbo :...............................................................................................

Lando :...............................-Naskiĝjaro:........................Telefono :.................................

Profesio : .......................................Intereso :...........................................................

esprimas deziron aliĝi kiel aktiva membro al SAT kaj promesas subteni laŭ mia povo ĝian agadon kaj konduti konforme al la spirito kaj teksto de ĝiaj Statuto kaj regularo.

Dato:...............................Subskribo :....................................  Skribu preslitere !!!

# ALIĜDEKLARO

67, avenue Gambetta
FR-75020 PARIS
Tel.: +33.1.47.97.87.05
Fax: +33.1.47.97.71.90
E-poŝto : satesper@noos.fr

Leginte la dorspaĝe presitan ekstrakton el la Statuto de SAT, kompreninte kaj aprobinte la celon de tiu ĉi Asocio, mi :

Familia nomo :.......................................................Persona nomo :.................................

Adreso :...............................................................................................................

..........................................................................E-poŝto................................................

Esperantofonetika prononco de la urbo :...........................................................................

Esperanta nomo de la urbo :...............................................................................................

Lando :...............................-Naskiĝjaro:........................Telefono :.................................

Profesio : .......................................Intereso :...........................................................

esprimas deziron aliĝi kiel aktiva membro al SAT kaj promesas subteni laŭ mia povo ĝian agadon kaj konduti konforme al la spirito kaj teksto de ĝiaj Statuto kaj regularo.

Dato:...............................Subskribo :....................................  Skribu preslitere !!!

**EKSTRAKTO EL LA STATUTO DE S.A.T.**

**CELO**

1.-Sub la Nomo *Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT)* estas fondita Asocio, kiu celas : a) utiligi praktike la internacian lingvon ESPERANTO por la klasaj celoj de la Laboristaro tutmonda; b) kiel eble plej bone kaj digne plifaciligi la interrilatojn de la membroj, tiel kreskigante ĉe ili fortikan senton de Homeca solidaro; c) lernigadi, instruadi, klerigadi siajn membrojn tiele, ke ili fariĝu la plej kapablaj kaj plej perfektaj el la tiel nomataj internaciistoj; ĉ) servi kiel peranto ĉe la interrilatoj de nesamlingvaj asocioj, kies celo estas analoga al tiu de SAT; d) peri kaj ĉiel eble helpi al kreado de literaturo (tradukoj kaj originaloj) spegulanta la idealon de nia Asocio.

SAT, ne estante partipolitika, sed nur kleriga, eduka, kultura organizo, celas, ke ĝiaj membroj estu komprenemaj kaj toleremaj rilate al la politikaj kaj filozofiaj skoloj aŭ sistemoj, sur kiuj sin apogas la diversaj klasbatalaj laboristaj partioj kaj sindikatmovadoj; por komparo de faktoj kaj ideoj, per libera diskutado ĝi celas malebligi ĉe siaj membroj la dogmiĝon de la instruoj, kiujn ricevas en siaj apartaj medioj.

Unuvorte, SAT celas per konstanta uzado de racie elpensita lingvo kaj ĝia mondskala aplikado, helpadi al la kreado de racie pensantaj spiritoj, kapablaj bone kompari, ĝuste kompreni kaj prijuĝi ideojn, tezojn, tendencojn kaj sekve kapablaj elekti memstare la vojon, kiun ili opinias plej rekta, aŭ plej irebla por la liberigo de sia klaso kaj forkonduko de la homaro al kiel eble plej alta ŝtupo de civilizo kaj kulturo.

**MEMBRECO**

2.-Ekzistas 2 kategorioj da membroj : aktiva kaj subtenanta.

3.-povas esti aktiva membro ĉiu persono, scipovanta Esperanton, kiu akceptinte ĉi tiun Statuton, pagas la jarkotizon, ĉiujare fiksitan de la Plenum-Komitato (P.K.).

4.-Aktivaj membroj rajtas : A) ricevi la Jarlibron kaj oficialan organon de la Asocio, B) partopreni en ĉiu referendumo; C) voĉdoni en la kongresoj; Ĉ) uzi la ĝeneralajn servojn de la Asocio.-Aktivaj membroj do povas influi la gvidadon de la Asocio; ili havas la devon ĉiel laŭpove helpi al la progresado kaj bona funkciado de la Asocio.

La samfamiliano(j) de aktiva membro povas ĝui la samajn rajtojn kiel ĉi tiu lasta, pagante nur la duonan kotizsumon.-Tiaj membroj tamen ne ricevas apartan ekzempleron de la oficiala organo.

**SERVOJ**

24.-La servoj de la Asocio estas rezervataj al ĝiaj membroj, aktivaj aŭ subtenantaj.

25.-Principe la membroj aktivaj devas doni senpage informon kaj helpon pri vojaĝo, enketo, ktp.-al ĉiu membro, kiu sin turnas al ili.-Ili havas la devon respondi ĉiun laŭregulan informpeton de alia membro, en templimo de 15 tagoj, eĉ se ili havas nenian kompetenton por plenumi la deziron de la petanto.-Tamen, ili rajtas ne respondi al petanto se : A) la letero ne estas redaktita esperantlingve, B) la peto havas karakteron konfidencan aŭ ofendan, C) la afero postulas elspezojn, ekzemple se responda afranko ne estas aldonita, Ĉ) la membronumero ne estas indikita.

26) Resume : ĉies devo estu tia, ke la Asocio fariĝu kvazaŭ tutmonda retaro, kies maŝoj estas solidaraj inter si, kaj ke ĉiu trovu en alia membro la plej certan peranton por vojaĝo, dungiĝo, informo, enketo, serĉoj, ktp.

La membroj firme konvinkiĝu kaj neniam forgesu, ke ilia aparteno al SAT donas al ili ne nur rajtojn, sed ankaŭ devojn : la Asocio ja havas praktikan kaj idealan celon, ĉies devo estu do memedukiĝi por fariĝi ĉiurilate inda batalanto laboranta efike al starigo kaj prosperigo de senklaseca kaj senekspluateca socio.

ALIĜU AL SAT KAJ
DISKONIGU LABORISTAN
ESPERANTISMON !

**EKSTRAKTO EL LA STATUTO DE S.A.T.**

**CELO**

1.-Sub la Nomo *Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT)* estas fondita Asocio, kiu celas : a) utiligi praktike la internacian lingvon ESPERANTO por la klasaj celoj de la Laboristaro tutmonda; b) kiel eble plej bone kaj digne plifaciligi la interrilatojn de la membroj, tiel kreskigante ĉe ili fortikan senton de Homeca solidaro; c) lernigadi, instruadi, klerigadi siajn membrojn tiele, ke ili fariĝu la plej kapablaj kaj plej perfektaj el la tiel nomataj internaciistoj; ĉ) servi kiel peranto ĉe la interrilatoj de nesamlingvaj asocioj, kies celo estas analoga al tiu de SAT; d) peri kaj ĉiel eble helpi al kreado de literaturo (tradukoj kaj originaloj) spegulanta la idealon de nia Asocio.

SAT, ne estante partipolitika, sed nur kleriga, eduka, kultura organizo, celas, ke ĝiaj membroj estu komprenemaj kaj toleremaj rilate al la politikaj kaj filozofiaj skoloj aŭ sistemoj, sur kiuj sin apogas la diversaj klasbatalaj laboristaj partioj kaj sindikatmovadoj; por komparo de faktoj kaj ideoj, per libera diskutado ĝi celas malebligi ĉe siaj membroj la dogmiĝon de la instruoj, kiujn ricevas en siaj apartaj medioj.

Unuvorte, SAT celas per konstanta uzado de racie elpensita lingvo kaj ĝia mondskala aplikado, helpadi al la kreado de racie pensantaj spiritoj, kapablaj bone kompari, ĝuste kompreni kaj prijuĝi ideojn, tezojn, tendencojn kaj sekve kapablaj elekti memstare la vojon, kiun ili opinias plej rekta, aŭ plej irebla por la liberigo de sia klaso kaj forkonduko de la homaro al kiel eble plej alta ŝtupo de civilizo kaj kulturo.

**MEMBRECO**

2.-Ekzistas 2 kategorioj da membroj : aktiva kaj subtenanta.

3.-povas esti aktiva membro ĉiu persono, scipovanta Esperanton, kiu akceptinte ĉi tiun Statuton, pagas la jarkotizon, ĉiujare fiksitan de la Plenum-Komitato (P.K.).

4.-Aktivaj membroj rajtas : A) ricevi la Jarlibron kaj oficialan organon de la Asocio, B) partopreni en ĉiu referendumo; C) voĉdoni en la kongresoj; Ĉ) uzi la ĝeneralajn servojn de la Asocio.-Aktivaj membroj do povas influi la gvidadon de la Asocio; ili havas la devon ĉiel laŭpove helpi al la progresado kaj bona funkciado de la Asocio.

La samfamiliano(j) de aktiva membro povas ĝui la samajn rajtojn kiel ĉi tiu lasta, pagante nur la duonan kotizsumon.-Tiaj membroj tamen ne ricevas apartan ekzempleron de la oficiala organo.

**SERVOJ**

24.-La servoj de la Asocio estas rezervataj al ĝiaj membroj, aktivaj aŭ subtenantaj.

25.-Principe la membroj aktivaj devas doni senpage informon kaj helpon pri vojaĝo, enketo, ktp.-al ĉiu membro, kiu sin turnas al ili.-Ili havas la devon respondi ĉiun laŭregulan informpeton de alia membro, en templimo de 15 tagoj, eĉ se ili havas nenian kompetenton por plenumi la deziron de la petanto.-Tamen, ili rajtas ne respondi al petanto se : A) la letero ne estas redaktita esperantlingve, B) la peto havas karakteron konfidencan aŭ ofendan, C) la afero postulas elspezojn, ekzemple se responda afranko ne estas aldonita, Ĉ) la membronumero ne estas indikita.

26) Resume : ĉies devo estu tia, ke la Asocio fariĝu kvazaŭ tutmonda retaro, kies maŝoj estas solidaraj inter si, kaj ke ĉiu trovu en alia membro la plej certan peranton por vojaĝo, dungiĝo, informo, enketo, serĉoj, ktp.

La membroj firme konvinkiĝu kaj neniam forgesu, ke ilia aparteno al SAT donas al ili ne nur rajtojn, sed ankaŭ devojn : la Asocio ja havas praktikan kaj idealan celon, ĉies devo estu do memedukiĝi por fariĝi ĉiurilate inda batalanto laboranta efike al starigo kaj prosperigo de senklaseca kaj senekspluateca socio.

ALIĜU AL SAT KAJ
DISKONIGU LABORISTAN
ESPERANTISMON !